HEROLDO DE ESPERANTO

Eldono: *Flandra Esperanto-Instituto, P. v. Humbeekstr. 3, Brussel-West.*
Redakcio-Administracio: *T.Jung, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Ned.*
Abonkotizo por la kuranta periodo (januaro-septembro 1947 = 9 monatoj): *Belgujo 100 fk., Nederlando 5.50 gld., cetere 2.50 dol. aŭ 10 angl. ŝil.*
Anoncetoj : *20 komencitaj vortoj aŭ mallongigoj b. fk. 20.—, gld. 1.— ktp.*

DUONMONATA INTERNACIA ORGANO DE LA ESPERANTO-MOVADO

N-ro 2 (1061) | FONDITA EN 1920 — 23-a JARKOLEKTO | 15 Januaro 1947

Okaze de la jarŝanĝo, angla samideano sendis al ni simplan sed belsimbolan kalendareton. Ĝi montras la terglobon. Sub ĝi du manojn interplektitajn super la verda stelo kaj la vorto ESPERANTO. Maldekstre kaj dekstre la vortojn AMO kaj PACO.

Kaj vere : Esperanto, Amo kaj Paco apartenas kune. Ili estas tri vortoj kaj tri konceptoj nedisigeblaj unu de la aliaj. Vera Esperantisto ne povas ne esti pacema, ne povas ne ami siajn kunhomojn. Vera amanto de la homaro kaj sincera pacamanto ne povas esperi atingi siajn celojn sen la efika rimedo por tio, sen lingvo internacia, do sen Esperanto.

*

Tial ni levu tre alten la Verdan Stelon, por ke ĉiuj bonvoluloj kaj ĉiuj pacamantoj vidu ĝian brilon, kaj aliĝu al ni. Ni bezonas ilin, same kiel ili bezonas nin. Kaj komune ni batalu kaj laboru ! Por la nova mondo, por pli bona estonteco, kaj por pli feliĉa homaro !

La Estonteco de UNESCO.

De *Julian Huxley*, F.R.S., D.Sc.

UNESCO, aŭ Unesko, kiel ni preferus skribi laŭ la Esperanta ortografio, estas tiu sekcio de UNO, kiu devos trakti ankaŭ la problemon de mondhelplingvo, kiam tiu ĉi temo venos oficiale antaŭ la forumon de la Unuigitaj Nacioj. Tial certe interesos niajn legantojn artikolo el la gazeto « Discovery » pri la estonteco de UNESCO. Kvankam tiu ĉi artikolo aperis jam en marto 1946, la ideoj esprimitaj en ĝi restas aktualaj ankaŭ nun. La artikolon tradukis (kun permeso) angla samideano L.B.

D-ro Julian Huxley (nepo de la glora profesoro Thomas Huxley kaj frato de la fame konata romanisto Aldous Huxley, kaj antaŭe la sekretario de la Zoologia Societo de Londono) elektiĝis administra sekretario de la Pretiga Komitato de UNESCO (United Nations' Educational, Scientific and Cultural Organization, t.e. la Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de la Unuigitaj Nacioj). En la jena parolado al la «Konferenco pri la Scienco kaj la Bonstato de la Homaro», kiu okazis en Londono dum februaro, li esprimis sian personan opinion pri eblaj taskoj de UNESCO. En la sekvanta artikolo oni prezentas la elstarajn punktojn de lia parolado.

*

Estas evidente ke bezoniĝos multe da organiza pensado. Kio devos esti la rilato de UNESCO al aliaj organoj de la Unuigitaj Nacioj ? Mi ne scias, kio estas en la menso de aŭtoritatuloj ; sed mi supozas ke ĝi unuagrade rilatos al la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro kaj ne al la Ĝenerala Kunveno (« Assembly »). Sed estas evidente ke ankaŭ devus esti ia kunligo kun la Atoma Komisiono kaj la Sekureca Konsilantaro, kiel ankaŭ kun la Kuratora Konsilantaro, ĉar ĉi tiu jam stariĝis. Estas ankaŭ evidente ke devus esti (science kaj alie) kunligo kun la aliaj specialaj organizoj, kiujn oni nuntempe starigas rilate

(Vidu pĝ. 3, kol. 1)

Nia lingvo en la patrujo de Esperanto

Kiel en aliaj landoj, tiel ankaŭ en Polujo la naziistaj enpenetrintoj kontraŭbatalis la Esperanto-movadon kun persista obstino. Sufiĉas diri ke en multaj urboj, jam en la dua aŭ tria tago de ilia okupado, germanoj venadis al Esperanto-grupoj aŭ al individuaj esperantistoj kaj bruligadis la bibliotekojn, foje eĉ kun ties posedantoj.

Nun en libera Polujo, malgraŭ multaj rekonstruaj laboroj, malnovaj pioniroj, revenintaj el koncentrejoj aŭ el migrado, tuj komencis kunvoki la adeptojn de Esperanto.

La tasko ne estis facila. Kaŝe enmurigitaj lernolibroj kaj insignoj preskaŭ ĉiuj pereis kune kun la bombdetruitaj domoj. Oni devas presigi novajn librojn, sed niaj presejoj kun Esperantaj supersignoj ankaŭ kuŝas en ruinoj. La antaŭmilitaj oficejoj kaj kunvenejoj ne plu ekzistas, kaj trovi aliajn estas malfacile. Kvankam nia Asocio de Esperantistoj ankoraŭ ne havas propran oficejon, ni tamen komencis gvidi kursojn inter la ruinoj.

Malnovaj samideanoj, konataj pro antaŭmilita propagando en urboj Borislav, Sosnoviec, Dombrova Gornicza kaj vilaĝo Susiec, la geedzoj Heleno kaj Boleslao Czechowski, reveninte al Varsovio, jam komencis planan laboradon per cirkuleroj al asocioj kaj per instruista kurso.

Mankas la tempo, mankas rimedoj, tial la kurso por lernejaj instruistoj daŭris nur 38 horojn. Mem s-ano Czechowski ne kredis je bona rezultato, sed lia lerta Cseh-metoda instruado estis brile kronita ĉe la lasta leciono, kiam li rakontis al ni pri kutimoj de esperantistoj en la mondo. Plezure ni konstatis ke el lia 35-minuta parolado ni ĉion komprenis. La soleno fariĝis kortuŝa, kiam neatendite leviĝis maljuna popol-instruistino s-ino Filomeno Paczoska kaj entuziasme improvizis sepminutan dankesprimon; antaŭ la kurso s-ino P. ne konis eĉ la Esperantan alfabeton. Ni kursanoj ĉiuj plenumis publikan ekzamenon kaj, libere parolante, studas por plua perfektiĝo.

Baldaŭ post la unua, s-ro Czechowski festis publikan ekzamenon de dua (3-monata) kurso, kaj ĵus li komencis trian kurson (la 34-an en sia vivo), por ŝtatoficistoj, kun 32 partoprenantoj.

Ni ĉiuj preparas nin por instrui Esperanton en lernejoj (kun ŝtata salajro) kaj en kursoj ĉe diversaj laboristaj klerigaj asocioj.

Mi aldonas kelkajn fotojn. La supra bildo montras partoprenintojn de la porinstruista kurso, farante unuan konversacion inter la ruinoj de Varsovio. Maldekstre kaj dekstre ges-roj Czechowski, meze (la plej malalta) s-ino Paczkoska, la plej alte staranta persono estas la aŭtoro de tiu ĉi raporto. La malsupra bildo montras la Ekzamenan Komisionon elektitan de la publiko ; de maldekstre dekstren : reprezentanto de fervojista sindikato, s-ro Cz. Biernacki, redakciano s-ano Bugajski, s-ano Czechowski kaj Esperanto-instruisto Wit. Majewski.

Eks-kursano WACLAW DANOWSKI.

La kanto pri Warszawa

Originala teksto kaj muziko de *Albert Harris*.

Warszawa (*), vi urbo de l' koro,
La perlo de l' urboj sur ter',
Defendis ni vin kun honoro,
Dum premis nin forta doloro.
Ni fuĝis de l' hejma tereno,
Similis la tagoj al jar' ;
Sed tamen ekstaze en nia konsci'
Muĝadis la kant' pri Warszawa,
Kaj ardis en fajro konstante al ni
La nom' adorata : Warszawa.

Warszawa, el vundoj kaj koro
Forgutas la sango de vi ;
Sed kiel vekiĝas la floro,
Vi baldaŭ ridetos tra ploro.
Denove kun rava belego,
Levita el polvo kaj rub',
Radios vi ree pro ĝojo kaj bril'.
Vi levos la kapon, Warszawa,
Kaj ĉirkaŭ la mondo resonos jubil'
El kanto pri glor' de Warszawa.

Tradukis el la sveda :
S. A. JACOBSON.

(*) Pr. Varŝava, la pola nomo de Varsovio.

La Kajgun-kanto

Unua filmkanto originale verkita en Esperanto.

Kio estas Kajgun ? Ĝi estas imagita — do, ne ekzistanta — insulo ie en la Suda Maro, la scenejo de la Paramount-filmo « La vojo al Singapuro ». En angla lingvo ĝi nomiĝas *Kaigoon*.

La filmo « La vojo al Singapuro » aperis jam en 1940, sed pro la milito ĝi nur nun estas montrata en landoj estintaj sub germana aŭ japana okupado.

La Kajgun-kanto estas kantata de la indiĝena loĝantaro de l' imagita insulo dum geedziĝofesta danco. Tiu ĉi kanto estas originale verkita en Esperanto. Origine ĝin devis kunkanti la filmsteloj Dorothy Lamour kaj Bing Crosby, kaj ili ricevis de nia samideano Joseph R. Scherer instruadon pri la elparolado de nia lingvo. Sed poste tiu ĉi ideo estis forlasata, kaj la kanton kantas nur ducento da « indiĝenoj ». La virinoj kantas tre melodie, malrapide kaj klare. Sed la viroj kantas « terure » rapide kun akompano de tambura batado. Do, estas ne tre facile, kompreni la tekston. Tial, por niaj gesamideanoj, kiuj ankoraŭ vizitos la filmon, ni publikigas ĝin ĉi-sekve. Ni aldonu ke la Kajgun-kanton verkis Johnny Burke kunlabore kun Joseph R. Scherer, kaj ke la muziko estas komponita de James V. Monaco. Se la loko permesos, ni publikigos en iu sekvonta numero artikolon de s-ro Scherer pri intervjuo kun la fama kantverkisto Johnny Burke. Kaj jen la teksto de la Kajgun-kanto :

VIRINOJ :

Jen la luno nova
brilas amon nur,
kaj virino viron
ravas laŭ natur'.

VIROJ :

Nun elektu iun kaj do dancu kun li,
Vera koro batas ja en ĉiu de ni ;
Preta kaj kapabla kaj volanta por vi ;
Do ne staru vane, venu nu tien ĉi !

VIRINOJ :

Jen la luno nova
brilas amon nur,
kaj virino viron
ravas laŭ natur'.

VIROJ :

(Sekvas longa serio da gorĝaj sonoj kun ugh-ugh ... ĉu-ĉu ... ĉi-ku ... ĉi-ka ... ktp.)

ĈIUJ :

Ĉielo, ho, ke jen, kardolĉulino vi,
revados vi pri mi ...
Pluvos, kaj teruros la bru'
de fulmo kaj tondro en Kajgun ;
Ankaŭ iam venos malĝoj',
sed nenio venkos l' amon nun ...

Ĉielo, ho, jen kisoj por sigeli
la promeson ...
Eterne kune ; du kiel unu ...

Jen la luno nova
brilas amon nur,
kaj virino viron
ravas laŭ natur'.

(Sekvas ripetado de la supraj linioj dum la tuta longa dancado. La virinoj elektas viron por danci, kaj se li dancas kun ŝi, li aŭtomate fariĝas ŝia edzo. La voĉoj kaj la vortoj pli kaj pli miksiĝas.)

****

« Kara Samideano Kreditbanko ! »

Unu el la plej grandaj hungaraj bankoj, la Hungara Generala Kreditbanko en Budapest, aliĝis kiel Entrepreno al IEL. Pri tio oni skribis el Budapest al la redakcio de Heroldo :

Tiu fakto kompreneble ne signifas, ke oni skribu al la banko kiel « samideano », petante « korespondantojn, poŝtmarkojn » aŭ « ampakaĵon, sukeron » ktp., kiel (ni devas honti pri tio !) oni efektive skribis al la Turisma Oficejo de Budapest. Sed oni skribu en Esperanto komercajn leterojn, petante informojn pri hungaraj komercaj entreprenoj, bankaferoj ktp. kaj oni rekomendu al aliaj bankoj, ke ankaŭ ili rekonu Esperanton, ekuzu ĝin kaj komencu korespondi kun alilandaj institutoj kaj firmoj, precipe en malgrandaj landoj. Al IEL, kiel Entreprenoj, aliĝis jam la Turisma Oficejo, la Urba Sanigbaneja Komitato, la hotelo Continental kaj la Landa Biblioteka Centro. Helpu ilian konservadon por nia movado per seriozaj kaj fakaj leteroj al ili ! Atentigu pri la fakto vialandajn institutojn !

URTIKO.

SAVKLAPOJ.

Optimismo instruas, ke ĉio estas bona. Oni nur eltrovu, por kio, kiam, kie, kiel ĝi estas taŭga. Pluraj samideanoj eble ne scias, kial *Ido* kaj *Occidental* efike helpas nian laboron en Esperantujo. Ili ne pensis pri tio.

Al mi tiuj projektoj ŝajnas nepre necesaj por la venko de nia mondlingva ideo. Mi tre simpatie atentas ilin ambaŭ kaj posedas ĉion, kion oni presas en la du sistemoj. Mi timegas, ke ili tro frue tute malaperos de la mondo, ĉar tiu malapero estus katastrofa por Esperanto.

Ne juĝu min paradoksa, ĉar mi estas praktika optimisto.

Ĉie ekzistas malkontentaj ekstremistoj, kiuj ĉion deziras refari. En nia movado, tiuj malkontentuloj volas ĉiam reformi la lingvon, fari ĝin denove ; sed iliaj tendencoj estas ofte kontraŭaj inter si : kelkaj volas ke la lingvo estu multe pli logika, pli artefarita, pli detalema. Aliaj postulas precize la malajn kvalitojn : la Lingvo Internacia estu pli natura, tute simila al niaj etnikaj lingvoj, tuj komprenebla sen antaŭa lernado.

Ilia polemikado interne de Esperantujo malebligus persistan laboradon kaj minacus la strukturon de la lingvo, dum ni bezonas konstrui grandan literaturon por varbi al ni la kleran parton de la homaro, kaj tian laboron nur povas fari sinsekvaj generacioj de esperantistoj pacience persistantaj en ĉiuj landoj. *Ido* kaj *Occidental* estas niaj savklapoj. Esperantisto deziras lingvon ofte reformatan, ĉiam pli kaj pli logikan, Esperanto ne kontentigas lin ; nu, lia feliĉo troviĝas en Idistujo, li tute nature estas altirata de la idistoj kaj lasas nin en paco por serioza laboro. Se li ne deziras Esperanton, ĉar ĝi ne estas tuj komprenebla, li postulas pli naturan sistemon, kiun multaj homoj povus legi sen antaŭlernado ; lin altiras Okcidentalujo, kaj ree ni pace laboras.

Por la konservado de la *Fundamento de Esperanto* kaj natura progresado de nia lingvo, sen rompo de ĝia kontinueco, Ido kaj Occidental estas nepre necesaj kiel savklapoj. Esperanto alproksimiĝas al la turnpunkto, kiam ĝi fariĝos utila al ĉiuj kleraj homoj pro sia funkciado kiel kulturlingvo tutmonda, nur dank' al nia kreskanta literaturo, kaj formado de literaturo postulas absolutan konstantecon en la strukturo de la lingvo. Se ni estus sub minacoj de reformoj, neniu kuraĝus eldoni librojn en Esperanto kaj la lingvo restus ĉiam kiel senutila projekto en diskutado de kelkaj sciencistoj.

Mi estas konvinkita ke Ido kaj Occidental estas tre necesaj al Esperanto.

ISMAEL GOMES BRAGA.

« Juko ».

Meze de decembro okazis en Haarlem (Nederlando), en junulargastejo « Jan Gijzen » la unua semajnfino de « Juko ». Kion signifas « Juko » ? Ĝi estas junular-komitato, kaj ĝi starigis grupojn, en kiuj povas partepreni junaj geesperantistoj de 16 ĝis 30 jaroj. Ĝi organizas semajnfinojn kaj junulvesperojn en diversaj junulargastejoj kaj ĉiuj partoj de Nederlando. Ĝi ankaŭ jam kontaktis kun eksterlandaj esperantistoj por interŝanĝa restado eksterlande dum 1947. Por informoj oni skribu al Bram. Korff, Bestevaerstr. 123 hs., Amsterdam W., aŭ al Ruilo F. van Putten, Celsiusstr. 162, Den Haag.

Kion skribis al ni niaj legantoj.

Post la lasta artikolo sub tiu ĉi rubriko denove atingis nin multaj leteroj. Dum iu tempo ni estis superŝutitaj precipe per materialo pri diversaj movadoj (abundeca, socikredita, belamia ktp.), kaj pro la publikigo de kelkaj artikoletoj kaj mencioj pri ili en unu sama numero ni perdis unu el niaj ĝis tiam plej fervoraj kunlaborintoj, ĉar li sentis sin tedita de ili ! Kompreneble, ni ne povas pro la malplaĉo ĉe unu eĉ fervora amiko malakcepti materialon kiu eble interesos cent aliajn legantojn.

Rigardante Heroldon kiel kokon.

Ezemple skribis al ni unu brito : « Mi rigardas Heroldon kiel kokon kiu ekkrias la novan tagiĝon, do mi *ĝojas* trovi en la nuna numero la artikolojn pri la socikredita movado. » Aliflanke ni konstatas ke iuj el la defendantoj de novaj teorioj estas tre (tro) ekskluzivemaj.

Ĉu ĉiuj ĝisnunuloj eraris ?

Tiel ni, kaj la plimulto de niaj legantoj, certe ne povas konsenti, se unu el la propagandistoj de Socikredito asertas :

ke la malbonvolo de la homaro *tute ne* kaŭzas militadon ;

ke la diverseco de lingvoj *tute ne* kaŭzas internacian malamon kaj, *tute certe ne*, militistan bataladon inter la nacioj ;

ke la kaŭzo de internacia buĉado militista estas *sole* financ-ekonomia ;

ke antaŭ ol oni ne solvos la ekonomian kaŭzon de la militado inter la nacioj, ĝi daŭre, ripete, okazos ;

ke la ekonomia solvo, kiu *sola* certigos mondpacon, estas Socikredito.

Certe nia amiko pravus, se li dirus ke *unu* kaŭzo de la internacia buĉado estas financ-ekonomia. Dirante, ke ĝi estas la *sola* kaŭzo, li malpravas. La vero estas ke *diverseco de lingvoj, rasoj, religioj, moroj, kaj la malbonvolo de individuoj kaj popoloj, kaj ekonomiaj malfacilaĵoj* povas kaŭzi militojn. Se ni sukcesos, forigi la ekonomiajn malfacilaĵojn, enkonduki tuthomaran lingvon kaj eduki la individuojn kaj popolojn al toleremo, ni forigos la diversajn kaŭzojn de milito. Se ni forigus nur unu el la kaŭzoj, kaj ne forigus la aliajn, militoj tamen okazus. Ni estu vasthorizontaj kaj ne insistu pri nur unu afero kiun ni mem speciale karesas.

Esperantista salutgesto.

La artikolo de s-ro Robertson en la numero de 15.10.1946 instigis plurajn legantojn al respondo. Unu el tiuj respondoj ni publikigis en la numero de 15.12., la ceterajn ni sendis al s-ro Robertson por eventuala persona respondo al la skribintoj. Unu skribinto aldonas, ironie, kelkajn pliajn manierojn de salutado, ekz. speciala saluto inter komencantoj estu manlevo horizontale, inter progresintoj oblikve, inter diplomitoj vertikale. Gejunuloj, samtempe, faru kapriolon, gemaljunuloj levu kvinfoje la maldekstran ŝultron, kripluloj kvinfoje palpebrumu, ktp.

Nia rilato al germanaj esperantistoj.

Ĉi tiu temo ankoraŭ revenas en diversaj leteroj. Itala samideano demandas : « Germanoj estis kruelaj kaj uzis teroron dum la pasinta milito ? Jes, mi konsentas. Sed ĉu vi kredas ke aliaj tute ne makuliĝis per krueleco kaj ne uzis teroron ? Mi povas al vi diri, kiel ekzemplon inter centoj, ke itala urbo Treviso (30.000 loĝantoj) en printempo 1944, per unufoja aeratako, estis preskaŭ tute detruata de la aliancanoj, kiuj mortigis 6000 senkulpajn personojn. *Kaj tiuj malfeliĉuloj estis senpacience atendantaj la liberigontojn !* Kaj la ĵetado de atombombo sur Hiroŝima verŝajne ne estis kruela buĉado ? » Tre prave nia itala amiko opinias ke la raportoj pri kulpaĵoj ne devas esti farataj celante venĝon kaj disvastigon de malamika sento aŭ malproksimigon inter la popoloj, sed nur por nin plibonigi kaj por igi nin eviti ke ni falu en la samajn pekojn.

Danĝeroj kiuj minacas Esperanton.

La sama itala samideano parolas ankaŭ pri la danĝeroj kiuj minacas Esperanton post la dua mondmilito. Li diras ke, post repremo de la germana lingvo pro la malvenko de Hitler, ekzistas la danĝero ke la angla lingvo estu altrudata kiel internacia mondhelplingvo, eĉ kontraŭ eventuala kontraŭstaro de Rusujo. Alian danĝeron, ke Esperanto povus esti anstataŭata de alia helplingva projekto, opinias la skribinto ne tiel grava, ĉar tia projekto tamen estus bazita sur Esperanto. Tre grava danĝero, laŭ li, estus eventuala tria mondmilito, kaj pri tio li absolute pravas : « Se ĝi okazus, per la novaj potencaj armiloj, kiel atombombo kaj aliaj, inventotaj, kune kun la ruino de Eŭropo kaj ĝia kulturo ankaŭ Esperanto finus sian vivon. Ĉar estas certe ke estonta venkinto superregus la tutan mondon, kaj sendube lia lingvo fariĝus internacia. Esperantismo estos la savanto de la homaro, se ĝi sukcesos eviti la katastrofon. »

Heroldo grandformata aŭ revueca ?

« Mi ne tre ŝatas tiel grandformatajn gazetojn, » skribas nederlanda leganto. «Ĉu ne estas eble duonigi la formaton kaj duobligi la nombron de la paĝoj ? » Kompreneble tio estus ebla ; sed ĉu konsilinda ? Heroldo dekomence aperis proksimume en la sama granda formato. La ideo estis ke, krom la 50, aŭ 100, etformataj kaj malofte aŭ neregule aperantaj revuoj, ni havu almenaŭ unu grandformatan, ofte kaj regule aperantan veran gazeton, similan al naciaj taggazetoj (« la estonte ĉiutaga ĵurnalo de Esperantujo », ni skribis en la unua prospekto pri la fondota entrepreno, la 1-an de marto 1920). Do, oni ja komprenos nian heziton malgrandigi la formaton. La nuna formato eĉ kun nur 4 paĝoj faras certan impreson; revuo kun 8, eĉ kun 16 paĝoj neniel impresus.

Laŭdo al Marcel George.

« Mi opinias ke la artikolo de Marcel Georges pri la Int. Kongreso pri Nova Edukado en Parizo (Heroldo 15.10.46) estas inter la plej valoraj, » skribas angla samideano en Egiptujo. « Tiajn informojn, se eble pli rapide liveritajn, ni bezonas pri ĉiuj internaciaj kunvenoj, pri la tradukaj aranĝoj kaj funkciado, eĉ kiam tute ne temas pri Esperanto. »

Diversaj deziroj.

Unu samideano deziras artikolojn pri Basic English kaj pri Radar. (Eble iu leganto povos havigi al ni kompententan manuskripton pri Radar ?) Iu samideano deziras ŝakrubrikon, alia artikolojn pri filatelo, kun fotoj de novaj poŝtmarkoj ktp., — deziroj efektivigeblaj, kiam Heroldo denove aperos ĉiusemajne kun 8-10 paĝoj (kiel en la jaroj 1928-1933).

Pri la landnomoj

skribis kelkaj samideanoj. Ni diru ke tiu temo estis kaŭzo de multaj diskutoj, eĉ disputoj, jam antaŭ 25 jaroj. Kiam la loko permesos ni tamen povos reveni al tiu temo en la rubriko « Nia Lingvo ».

Kion ni bezonas.

Ni bezonas por la redakcio *mallongajn* artikolojn pri interesaj aferoj ĝeneralaj kaj esperantistaj, *mallongajn* literaturaĵojn interesajn, *resumojn* pri ordinaraj Esperanto-aferoj laŭlande, *interesajn* fotojn el la esperantista vivo (novdatajn) ; ni *ne* bezonas *ampleksajn* artikolojn, *ampleksajn* literaturaĵojn, *longajn* poemojn, informojn pri ordinaraj Esperanto-aferoj de unuopaj kluboj.

Gratuloj kaj bondeziroj.

Gratuloj kaj bondeziroj okaze de la jarŝanĝo atingis nin de samideanoj kaj amikoj en diversaj landoj. Kelkaj samideanoj eĉ gratulis la redaktoron okaze de lia naskiĝofesto : pri tio kredeble « kulpas » la Enciklopedio de Esperanto. Koran dankon al ĉiuj !

ESPERANTO EN LA KOMERCA KORESPONDADO

Kiel ofte ni ja aŭdas, parolante kun ne-esperantistoj, la rimarkon ke en la ĉiutaga vivo oni nenion aŭ preskaŭ nenion vidas pri kiu ajn enpenetro de Esperanto en la komercaj rondoj. Certe ni povas la ne-esperantistojn atentigi pri la antaŭmilita (espereble ankaŭ postmilita) reklamo de diversaj foiroj kaj similaj entreprenoj, sed tiu Esperanto-enkonduko fakte nur atingas la *esperantistan* publikon.

Mi scias, ke individuaj esperantistoj, posedantaj propran firmon aŭ negocon, jam aplikas nian lingvon por siaj komercaj celoj, sed tio plejparte ne estas grandskala kaj, kiel mi diris ĉi supre, nur inter-esperantista reklamo.

Ĉu ni povas aliigi la nunan sintenon de la ne-esperantistaj komercistoj, kiuj ĝis nun restadis indiferentaj rilate al iu ajn apliko de Esperanto en ilia komerco ? Mi demandas : « Ĉu ni povas ? », kaj nia respondo devas esti : « Ni devas ! ». Multajn jarojn mi jam estas esperantisto, do mi certe konscias pri la skeptikismo de la komercaj rondoj en eventualaj klopodoj enkonduki iomgrade nian lingvon en ilia reklamo aŭ korespondado.

Mi prenu ekzemplon. Oficisto deĵoranta ĉe granda banko iun tagon petas al la bankdirektoro permeson apliki Esperanton en la banka korespondado kaj en la banka reklamo. Preskaŭ ĉiam la respondo estos : « Ĝis nun ni ne bezonis uzi Esperanton en nia bankservo, do la de vi petata apliko estas senutila. »

Per la nuna artikolo mi prezentos al vi, karaj gelegantoj, proponon, kiun mi tre volonte submetos al via konstruiga kritiko. Ni, esperantistoj, devas kompili listojn, kun la nomoj de esperantistoj, kiuj deĵoras ĉe la diversaj entreprenoj, kompreneble ne nur de la IEL-anoj sed ankaŭ de la samideanoj de aliaj Esperantaj organizoj, ĉu religiaj, ĉu politikaj, kaj eĉ de esperantistoj, kiuj pro iu ajn kaŭzo momente ne aliĝis al esperantista grupo. La kompilitajn listojn ni multobligu kaj ilin disponigu al la estrararoj de la esperantistaj grupoj, tiamaniere ke en ĉiu regiono aŭ provinco troviĝu almenaŭ unu listo. Por limigi la elspezojn, provizore ankoraŭ ne estas necese, ke ĉiu esperantisto posedu tian liston, sed sufiĉas ke ĉiu samideano sciu, ĉe kiu la listo estas konsultebla.

Nun mi revenas al mia ĵus menciita ekzemplo. Sveda aŭ hungara esperantisto bezonas la servojn de franca banko. Unue li sin turnu al la listposedanta persono en sia regiono kaj petu informon, ĉe kiuj francaj bankoj deĵoras esperantistoj. Revenpoŝte li informiĝas, ke ĉe ekz. 20 (aparte menciitaj) francaj bankoj deĵoras esperantisto, kaj nun nia sveda aŭ hungara amiko sin turnas esperantlingve al la banko por la komerca afero. En la maldekstra flanko de la letero li nur menciu la vorton «Esperanto», sed en la cetero de la letero li *evitu* aldoni, ke li scias ke esperantisto deĵoras. Ankaŭ nur unufoja indiko de la vorto « Esperanto » sufiĉas.

Kio okazas ? Malfermante la ĉiutage envenantan amason da leteroj iu oficisto vidas leteron en por li ne-ordinara lingvo kaj transdonas ĝin al sia ĉefo. Por informiĝi pri la enhavo de la letero la ĉefo faras esploron, kiu el la oficistoj scipovas Esperanton, ĉar esperantista helpo estas bezonata. Feliĉe, esperantisto deĵoras ĉe la banko, legas kaj tradukas la leteron, pritraktas aŭ pritraktigas la leter-enhavon kaj nun estas petata fari esperantlingvan respondon. Hura !, la unua paŝo de la oficiala enkonduko de Esperanto en la korespondado de la banko estas farita. La direktoro verŝajne ankaŭ sciiĝas pri la unua esperantlingva letero, kaj nun nia esperantista bankoficisto kaptas la okazon peti permeson por presigi sur la bankaj presaĵoj : « Ni korespondas en Esperanto », aŭ : « Esperanto korespondata ». Eble li sukcesas jam post la unua kontakto de la banko kun Esperanto, eble la banko prokrastas la permeson. En la lasta kazo ni devas atendi pluan esperantlingvan kontakton, kiu nun eble pli rapide povas efektiviĝi pere de la supre-menciitaj listoj. Se el alia lando nun denove venas esperantlingva bankkontakto, des pli facile estos por la bankoficisto refari la peton. Ni supozu, ke finfine la banko oficiale permesas presigi sur siaj presaĵoj : « Ni korespondas en Esperanto », tiam senpage por nia Esperanto-movado eliras kun ĉiu letero pli efika propagando ol ĉiaj aliaj interesperantistaj reklamiloj. Skeptikuloj, ricevantaj leteron de la eksterlanda banko, konvinkiĝas, ke Esperanto ne plu estas utopio, sed vere aplikata en la praktika vivo ; ĉar alikaze tiu grava banko certe ne presigus la koncernan indikon.

Ni ankaŭ ne forgesu, ke la dissenditaj bankleteroj atingos aliajn en- kaj eksterlandajn bankojn, ĉe kiuj deĵoras unu aŭ pluraj esperantistoj. Por tiu lasta grupo nun fariĝas pli facile — kun la leterpapero en la mano — peti de sia bankdirekcio imiton de la indiksurpreso : « Ni korespondas en Esperanto ».

Kompreneble mia propono validas ne nur por bankoj, sed por ĉiaj komercaj branĉoj, laŭlande menciotaj en la listoj. Se kompaniaj ĉefoj, prokuristoj, librotenistoj, vendistoj, aĉetistoj ktp., parolantaj Esperanton, povas elekti aŭ devas interkontakti kun la eksterlando, ili kompreneble, kiam iel ajn estas eble, skribu prefere nur al tiuj firmoj, bankoj ktp., kie laboras samideano ; sed refoje mi diras : neniam menciu la personan nomon de la esperantisto en la letero, ĉar se oni farus tion, la ne-esperantista firmo konsiderus la leteron kiel iomgrade (kaŝe por Esperanto) interesperantistan leteron, kaj tian impreson ni nepre evitu. Por ni, esperantistoj, la esperantlingva rilato estas propagandcela, sed tion la banko, firmo ktp. ne bezonas scii ; do, ni nur menciu unu fojon la vorton « Esperanto », por ke la leganto sciu, ke la letero ne estas skribita en iu fremda nacia lingvo. Plue nenion oni skribu rekte aŭ malrekte pri Esperanto.

Tre efika el propaganda vidpunkto estas ankaŭ la elmeto de afiŝo « Ni parolas en Esperanto » ĉe giĉeto, kie deĵoras esperantisto, ĉar tia afiŝo daŭre altiras la atenton de la komerca publiko. Akiri permeson elmeti tian afiŝon al mi ŝajnas relative facile por esperantista oficisto.

W. G. VAN EYNDTHOVEN.

Esperanto en Norvegujo.

Kiam la milito komenciĝis, la Esperanto-movado estis relative forta kaj vigla en Norvegujo. Tion montras ekz. la fakto ke aŭtune 1939 Norvega Esperantista Ligo trovis eble lui propran oficejon en la centro de Oslo. Tuj post la germana invado oni decidis ĉesigi ĉian propagandon kaj ceteran eksteran laboron, kaj dum la tuta milita tempo ni koncentrigis niajn fortojn pri la lingva perfektigado de la membroj.

Efektive ni estis bonŝancaj, ĉar la germanoj ne malpermesis nian movadon en Norvegujo, kvankam plurfoje estraranoj de NEL estis vokataj al la polico por ekzamenado. Nia organo « Esperantobladet » ricevis ordonon ne plu aperadi, sed multobligita cirkulero anstataŭis ĝin. Pluraj samideanoj mortis en la liberiga batalo kaj multaj sidis pli-malpli longtempe en malliberejoj kaj koncentrejoj. Kelkaj malpli fortaj kluboj malaperis, sed aliaj daŭre bone laboradis. Nur malmultaj kursoj okazis, sed la malnovuloj studis en studrondoj, kaj multaj faris ekzamenojn. La koresponda kurso elĉerpiĝis, kaj ni ne povis presigi novan. Ni ne povis ricevi literaturon el eksterlando. Ni ne povis korespondi kun eksterlando, sed anstataŭe la norvegaj esperantistoj korespondis inter si por tiel ekzercadi la lingvon.

Dum la lastaj militaj jaroj, kaj eĉ pli post la milito, la intereso por Esperanto grave kreskis en Norvegujo. Sed nun ni suferas pro manko de instruistoj. En diversaj urboj tamen lokaj samideanoj gvidas kursojn, kaj kursanoj aliĝas grandnombre. Tiel ekz. *en Oslo* dum la aŭtuno 1946 funkciis *kvar relative grandaj kursoj* samtempe.

La plej granda novaĵo post la milito estas ke oni ĵus fondis *eldonan akcian societon.*

En novembro 1946, Klubo Esperantista en Oslo, kiu dum la tuta tempo seninterrompe laboradis kaj eĉ kreskis, kvankam nur malrapide, festis sian 30-jaran jubileon per bela festo, dum kiu kelkaj meritplenaj gesamideanoj estis dekoraciataj per la kluba ordeno.

G. S.-B.

****

Propagando ĉe la P.T.T.

Antaŭ nelonge kreis kelkaj Parizaj gekolegoj en la Poŝtista Federacio komisionon por studi, propagandi kaj informi per Esperanto. Tiel ili celas helpi la Federacion en la rilatoj de kaj al eksterlando ; samtempe havigi al ĉiuj gekolegoj la rimedon lerni kaj uzi Esperanton.

Kaj dum la eksterordinara Nacia Kongreso de la Federacio, kiu okazis la 9.-13. 12., ili aranĝis en la antaŭĉambro ekspozicion de ĝenerala materialo pri Esperanto kaj de fakaj dokumentoj, nome : numerojn de Interligilo, de Esperanto Internacia, de Heroldo, poŝtkartojn ilustritajn kaj oficiale eldonitajn de la Administracioj, poŝtmarkojn kun Esperanta teksto ktp. La tabloj estis vizitataj dum la tempo inter la kunsidoj : oni kolektis subskribojn por la petskribo al UNO, donis parole informojn pri Esperanto kaj pruvis, finfine ke Esperanto vivas.

42 ŝakistoj el 14 landoj korespondludas per Esperanto

Esperanto-fako de ICCA sukcesis starigi jam sesan grupon de sia korespondturniro. La sesa grupo ekludis la 1-an de januaro. En ĉiu grupo ludas 7 ŝakistoj el 6-7 landoj, do en ĉiuj 6 grupoj ludas sume 42 ŝakistoj el 14 diversaj landoj.. Novaj grupoj estas preparataj kaj aliĝoj ĉiam akceptataj. Aliĝkotizo 5 anglaj ŝilingoj, pagotaj laŭ interkonsento kun la turnirgvidanto, D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio.

La Esperanto-fako de ICCA registris jam pli ol 100 adresojn de ŝakistoj-esperantistoj en 20 diversaj landoj. La Esperanto-fako de ICCA organizis unuan interŝtatan lukton Ĉeĥoslovakio-Nederlando (sur 10 ŝaktabuloj) kaj preparas duan tian lukton, nome Svedujo-Britujo. Por la kuranta jaro oni preparas novajn grupojn de korespondturniro. Nova grupo komencos tuj, kiam aliĝos 7 samideanoj el 6-7 landoj. Oni preparas ankaŭ turniron de landaj « teamoj » (po 6-10 ŝakistoj). Ŝakistoj-esperantistoj, kunlaboru !

La estonteco de UNESCO.

(Fino de la 1-a paĝo.)

al la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro, — nome la organizo pri la Nutraĵoj kaj la Terkulturo, la ILO (Internacia Laborista Organizo), la starigota organizo pri la Sano ktp. Persone mi esperas — kvankam mi kredas ke oni ankoraŭ ne decidis pri tio — ke la scienco reprezentiĝos ĉe la plej alta (t.e. la Konsilantara) nivelo en la formo de ia komitato malgranda sed forte influa, kiu povos konsili pri la sciencaj aferoj ĉiun el la tri plej gravaj konsilantaroj.

Se mi ĝuste komprenas, ĝenerale preferata opinio estas, ke oni devos starigi *plurajn ĉefajn sekciojn,* kiuj sin okupos pri apartaj fakoj. Kompreneble unu el tiuj fakoj estos la *edukado,* kaj la *scienco* alia, kaj tria sekcio koncernos la *artojn* kaj la *literaturon.* Se mi ĝuste komprenas, ekzistas sugesto ke kvara sekcio koncerniĝu pri la grandskalaj informrimedoj, ekzemple *radio, filmoj, gazetaro* ktp. Oni ankoraŭ ne decidis, ĉu oni starigu unu sciencan fakon aŭ du tiajn fakojn : unu por la naturaj kaj alian por la sociaj sciencoj. Se oni trovos tion tro komplika, ke unu fako enhavu ĉiujn sciencojn, mi kiel eble plej multe klopodos efektivigi ian potencan organizon, kiu kunligos la du fakojn.

Mi tre esperas, ke forte reprezentiĝos ĉe UNESCO la aplikitaj kaj industriaj sciencoj, kaj ke ni ne estos nuraj akademiuloj, malŝatantaj la praktikajn aferojn.

Evidente estas necese kunligi la sciencan sekcion kun la laboro de la aliaj sekcioj, kiuj koncerniĝos pri literaturo, filozofio, muziko kaj artoj, pri edukado kaj pri la grandskalaj informiloj. Unu el la proponoj, kiujn oni faris, estas ke tio estu farata de vico da funkciaj sekcioj, kiuj koncerniĝos pri praktikaj problemoj, ekzemple pri bibliotekoj, muzeoj, eldonaĵoj, resumoj, interŝanĝoj de personoj, lernolibroj ktp.

Kompreneble unu el la sekcioj devus esti sekcio, kiu sin okupos pri la « publikaj rilatoj » de UNESCO mem, kiu sciigos al la mondo kion UNESCO faras kaj kion ĝi esperas fari, kiajn informojn ĝi esperas havigi al si ktp. Estas evidente, ke ĉe tio grandmezure partoprenus la scienco.

Antaŭ ol ni konsideros la pli interesajn teoriajn problemojn, mi menciu alian praktikan problemon, t.e. konsentigi la necesan nombron da nacioj aliĝi al UNESCO.

Rilate al la ĝenerala demando, post iom da pripensado, kiom mi ĝis nun povis dediĉi al la afero, ŝajnas al mi, ke la plej grava kaj atentinda principo estas la jena : *La devo de UNESCO estas peni enkonduki en la mondajn aferojn pli da scienco, pli efikan sciencon kaj pli bone kunordigitan sciencon.*

(Finota.)

Walter Scott :

Milito estas la sola ludo, per kiu ambaŭ partioj malgajnas.

Pri letero en nekonata lingvo :

Gumba-Gumba

« Neue Berner Zeitung » raportas la sekvantan amuzan epizodon, tradukitan el gazeto « Liliput ». Temas pri stranga afero ĉe la brita cenzuro, nome pri letero en nekonata lingvo :

Ekde 1939 ekzistas en Londono centralo por la cenzurado de l' poŝta trafiko, kiu cenzuris ĉiujn korespondaĵojn kun la eksterlando. La cenzura oficejo okupis tiucele impresan nombron da cenzuristoj anglaj kaj eksterlandaj. Kutime ĉiu cenzuristo prilaboris unu solan lingvon, nome sian gepatran. Kiel sciate, la angloj ne estas lingvo-virtuozoj. Tial en la nomita centralo troviĝis ĉinoj, hebreoj, japanoj, ĉeĥoj, finnoj, hungaroj, eĉ birmanoj kaj tibetanoj. Oni ne bezonas akcenti ke la lojaleco de ĉiuj ĉi eksterlandanoj al Granda Britujo estis funde esplorita kaj « prenita sub la lupeon ».

Ĉiu el tiuj ĉi cenzuristoj estis specialisto, kaj preskaŭ ĉiuj disvolis en la jaroj de sia deĵorado nekredeblan trovkapablon, kiun oni preskaŭ povus nomi sesa senso.

Kiam iu letero ŝajnis al iu cenzuristo eĉ nur iomete dubinda, li tuj transdonis ĝin al speciala sekcio, kie kemiistoj, sciencistoj kaj ekspertoj pri kodoj, ekipitaj per la plej modernaj helpiloj, esploris la skribaĵon koncerne sekretajn inkojn, kodojn ktp.

Escepte de la franca, hispana, germana kaj itala, ĉiuj ceteraj lingvoj estis nomitaj lingvoj « nekutimaj ». Vizito al la sekcio por nekutimaj lingvoj estis speciale interesa afero. La homoj, kiuj tie laboris en plena silentado, estis kunvenigitaj el la tuta mondo. Neniu el ili parolis eĉ vorton. Sed la fremdlingvoj, kiujn oni legis tie, kvazaŭ leviĝis super la silentadon kaj ŝvelis al preskaŭ aŭdebla zumado.

Iutage okazis en la sekcio por nekutimaj lingvoj io nekredebla kaj neantaŭvidita : envenis cenzurota letero de iu al iu en fremda lando. La sekciestro sulkigis la frunton. La letero iris de pupitro al pupitro, kaj returne al la sekciestro : neniu kapablis deĉifri ĝin. La cenzuristoj sentis sin kvazaŭ puŝitaj antaŭ la kapon. Ili scipovis nenombreblajn fremdlingvojn. Sed ĉi tiu letero estis skribita en neniu el la lingvoj sciataj. Post longa kaj iom malagrabla konferenco, la pliparto de la demanditoj konkludis ke la letero estas verkita en *Gumba-Gumba,* dialekto parolata en certa regiono de Centra Afriko.

Kion fari ? Ĉu la letero pasu necenzurite ? Longan tempon la sekciestro pripensis pri tio. Fine li decidis, kontaktiĝi kun la Domo por Fremduloj, kie oni tenadis detalan kontrolon pri ĉiuj eksterlandanoj en Anglujo. Dank' al feliĉa hazardo la Domo por Fremduloj sukcesis trovi indiĝenon de tiu malproksima regiono, kie Gumba-Gumba estas la ĉiutaga lingvo. Lia nomo estis Amul, kaj li estis kelnero en Soho (konata Londona kvartalo).

Oficisto de la cenzura oficejo vizitis « Mister » Amul, kaj por la kelnero estis facile traduki la leteron. Por sia klopodo li ricevis 12 ŝilingojn kaj 6 pencojn, kaj tiel Amul kiel la cenzura oficejo estis kontentaj.

Proksimume unu monaton poste alvenis dua letero en la Gumba-Gumba-dialekto ĉe la sekcio por nekutimaj lingvoj. Ĉifoje neniu ekscitiĝis, nek konferenco nek malagrablaj disputoj estis necesaj. La sekcio tuj kontaktiĝis kun la kelnero, kaj denove Amul enpoŝigis sian honorarion de 12 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Sed post tio la korespondado en Gumba-Gumba plimultiĝis rapide : komence venis letero ĉiun duan semajnon, poste ĉiusemajne, kaj baldaŭ eĉ tri aŭ kvar leteroj en ĉiu semajno.

La speciala sekcio komencis ion suspekti kaj « metis kaptilon ».

Post malpli ol du semajnoj estis pruvite ke Amul mem estis la fervora Gumba-Gumba-korespondanto. Laŭdire la adresito estis amiko lia. Kiam oni montris al li la pruvmaterialon, li iom honte konfesis ke li estis la aŭtoro de la leteroj. Sed finfine ne ekzistis leĝo, malpermesanta skribi leterojn en Gumba-Gumba, li argumentis, aŭ ĉu ?

Li estis prava. La sola, kion la poŝta cenzuro povis fari kaj kion ĝi ja faris, estis ke ĝi reduktis la « honorarion » por la tradukado al duona krono (2 ŝilingoj kaj 6 pencoj). Krome oni serioze avertis s-ron Amul ke li iom maloftigu sian leterskribadon.

KOMENCU EDUKI VIAJN INFANOJN POR PACO !

Nia samideanino H. Wolff en S. Francisco verkis por la Sanfranciska sekcio de la Internacia Virina Ligo por Paco kaj Libereco flugfolion, kiu havas la jenan tekston:

Edukado por milito aŭ paco ? Detruo aŭ konstruo ? — Ne havas sencon instrui al niaj infanoj : « Vi ne devas mortigi ! », kiam samtempe ni plenigas iliajn manojn per ludiloj imitantaj murdilojn. Edukado komenciĝas en la infanseĝo, ne en la elektra seĝo. Sekve : komencu eduki viajn infanojn por paco strikte rifuzante aĉeti pistolojn, pafilojn, kanonojn, haŭbizojn ktp. Evitu ĉiujn ludilojn kiuj rilatas al milito kaj mortigado ! Komencu eduki viajn infanojn por paco, rifuzante sendi ilin al filmoj kie pafado kaj mortigado venenas la mensojn de la plej junaj. Tro multe da malfeliĉo ĝuste lastatempe okazis. Komencu eduki viajn infanojn por paco, rifuzante al ili aŭskulti misterajn kaj « gangster »-seriojn ĉe la radio. Tio estas por konstrui paceman mondon por la venontaj generacioj. Komencu eduki viajn infanojn por paco : ekzistas sufiĉe da konstruaj libroj kaj ludiloj, kiuj disvolvas pensadon, kiuj donas al ili okazon por disvolvi sian praktikan kiel ankaŭ sian idealan komprenon pri la vivo, tiel ke ili fariĝu valoraj membroj de sia lando kaj de la homaro.

Samtempe ni legis en Haga ĵurnalo la jenon (« Het Vrije Volk », 3.12.1946) :

Du knaboj, C.W., kaj J.H.P. ludis dimanĉvespere per revolvero. Eksonis pafo, kaj W. estis trafita en la ventron, tiel ke oni devis lin transporti al la hospitalo. Serĉante pliajn tiajn ludilojn en la hejmoj de la knaboj, la polico trovis tie tutan arsenalon. Krom malpli danĝeraj objektoj, kiel partoj de kontraŭaviadila kanono, kaskoj kaj gasmaskoj, malkovriĝis du aŭtomataj pafiloj, tri revolveroj, unu infanteria pafilo, pluraj bajonetoj, pli ol 1000 kartoĉoj kaj partoj de grenadoj. Ĉion la knaboj estis ŝtelintaj en la dunoj.

Komento superflua !

****

MIKSPOTO.

Trafiko inter Tero kaj planedoj.

Plej rapidaj aviadiloj nuntempaj estas la senhelicaj. Sur la loko, kie ĉe aliaj estas la motoroj, ili havas aparatojn, en kiuj okazas brulkonsumiĝa procedo, per kiu la senhelicaj aviadiloj kvazaŭ forpuŝas sin de la ĉirkaŭanta aero. Vojaĝoj al Luno kaj Marso verŝajne estos la sensacio de la venontaj generacioj. La ĉefa malfacilaĵo por tiaj vojaĝoj estas atingi rapidecon sufiĉe fulman por liberiĝi de la tera gravito. Oni taksas la plej grandan rapidecon de raketo je 12.000 kilometroj dum unu horo. Sed por liberiĝi de la tera gravito, oni bezonus rapidecon de 36.000 kilometroj. Kiu vivos, vidos !

Servamo, sen io.

El « E & I Bulletin » : Eksedziĝoj plimultiĝis en Germanujo ĝis tia grado, ke en kelkaj centroj, ekz. en Berlino, ili nun estas pli multnombraj ol la geedziĝoj. La Berlina gazetaro donas la sekvantajn kialojn por la rekorda nombro de eksedziĝoj : manko de viroj en edziĝa aĝo ; nesufiĉaj lokoj kaj eblecoj por gejunuloj, por renkonti unu la alian ; virinoj dum la milito edziniĝintaj al « uniformo », kiuj nun ne povas alkutimiĝi al tio ke iliaj edzoj estas simplaj laboristoj aŭ metiistoj.

Maljuneco.

En angla revuo « Leader » aperis artikolo de D-ro Maurice Ernest, kiu dum pli ol 40 jaroj dediĉis sin al speciala studo de centjaruloj. Laŭ siaj esploroj li kapablas konstati ke nur unu homa estaĵo fariĝis pli aĝa ol 113 jarojn. Tio estis Pierre Joubert en Charlesbourg (Kanado), vivinta verŝajne 113 jarojn kaj 100 tagojn. Kontraŭe al la plej multaj 100-jaruloj, Joubert pensis ke li estas multe malpli maljuna. Ernest estas konvinkita, ke ĉiaj pruvoj mankas por montri ke homoj ekzistis kiuj fariĝis pli ol 114-jaraj. Nur balenoj, elefantoj kaj giganttestudoj transpasas la maksimumon de la homa aĝo.

Centjarulina malĝojo.

Vilaĝanino centjariĝis. Honore al tiu okazaĵo la loka fanfar-orkestro por ŝi respektlude serenadas. Dum la alparolo urbestra ŝi subite laŭte ekploras. Kiam la urbestro ŝin demandas, kio ŝin premas, la patrineto balbute diras dum la plorego : « Mi trovas ĝin ... tiom malĝojiga ... ke miaj gepatroj ... ne povas ĉeesti. »

Monjonglado.

Lastan someron, la sesjara, kapturniga suprenirado de la kursoj ĉe la Novjorka Borso abrupte haltis. Oni ofertis tri milionojn da akcioj. La tutan perdon de la akciuloj dum ununura tago oni taksas je pli ol 300 milionoj da dolaroj. « Riĉeco sen gvido — kiel ĉevalo sen brido. »

Idealo.

« Kial vi ne edziĝis ? » demandis junulo al fraŭlo maljuna. — « Nu, aŭdu ! » respondis li. « Estante juna, mi intencis edziĝi nur al *ideala* edzino. Post multjara serĉado mi fine renkontis tian ... » — « Kaj poste ? » — « ... serĉis ankaŭ ŝi *idealan* edzon ! » la fraŭlo respondis malĝoje.

La gimnasto kaj la paralelaj stangoj.

En decembro vizitis nian landon aro da svisaj elitgimnastoj. La gazetaro ne bombaste anoncis ilian alvenon, kaj oni ne aranĝis intervjuon kun ili, kiel oni kutime faras, kiam eksterlandaj sportuloj aŭ filmherooj, multe admirataj de la publiko, transiras niajn limojn. Preskaŭ nerimarkite de la laika publiko, ili senbrue montris sian altnivelan gimnastikarton en diversaj urboj de Nederlando, vojaĝante per ordinara aŭtobuso de loko al loko. Mi ĉeestis bonegan prezentadon de ili en Hago, kaj la vizitantaro aplaŭdis entuziasme la lertajn gimnastojn, samtempe spertante eksterordinare belegan vesperon.

Nun ili revenis en sian landon kaj danke rememoras la simplan sed bonintencan akceptadon, kiun ili spertis flanke de la nederlandaj gegimnastoj. Ĉi-suban historieton mi dediĉas al iliaj brilaj prezentadoj, esperante baldaŭ revidi la svisajn kamaradojn.

*

Senindulga staras la aparato sur la scenejo. Kvar feraj piedoj portas du lignajn stangojn. Malhelpe, necedeme leviĝas la du bariloj en la aero. Alproksimiĝas gimnasto. Fortike li ektiras la maldolĉajn malantaŭajn partojn de la gimnastikilo por kontroli, ĉu ĝi firme staras. Nun li mezuras la spacon inter la du stangoj. Ĝi estas ekzakte tiom granda kiom la distanco inter la kubuto kaj la pinto de la longa fingro, kiam la gimnasto kurbigas la brakon. Ankoraŭ akra esplorrigardo sekvas, ĉu la ilo staras je la dezirata alteco. Ĉion li trovas bonorda. Preskaŭ sammaniere rajdisto rigardas kaj esploras sian ĉevalon.

Je distanco de kvin, ses paŝoj la gimnasto nun ekstaras kun tutstreĉita korpo, dum momentoj akre fiksante la rigardon sur la aparaton. Tiam li kuras per rapidaj, grandaj paŝoj de sia loko al la instrumento kaj, streĉante la brakojn antaŭen, li saltas en la mezon inter la du stangoj, tiel elegante kaj senhezite kiel naĝanto saltas en la akvon.

Kaj nun la laiko preskaŭ travivas miraklon. La ilo, evidente konstruita por malhelpi ĉian moveblecon kaj aspektanta obstina kaj rigida, submetas sin en la fortaj manoj de kapabla gimnasto. Dum la brakoj ripozas sur la stangoj, la ligno facile fleksiĝas, kaj tiamaniere ĝi helpas la gimnaston, dum la svingado levi sin sur la apogantaj brakoj. Sammomente la korpo jam svingiĝas alten super la stangoj. Subite okazas, ke la stangoj estas uzataj kiel plialtigita planko, sur kiu oni povas stari sur la manoj same fortike kiel sur la piedoj, kaj ... kial ne ? kiel kandelo la korpo leviĝas, streĉita de la fingroj ĝis la piedpintoj, kiuj klopodas trabori la plafonon. Nur momentojn la gimnasto restas en ĉi tiu brila sintenado. Tiam ŝajnas ke la forteco de la sekvanta movo senkatenigas senfinan vivgajecon, kaj nun la rigardanto vidas antaŭ siaj okuloj la plej diversajn movojn kaj ekzercojn, la plej esceptajn sintenojn kaj svingojn.

La du stangoj nun ŝajnas esti du nevideblaj linioj, inter, super kaj sub kiuj la gimnastikanto lasas ludi sian korpon en neimitebla kaj arta maniero. Finfine post alta, majstra svingo, ŝvebante tra la aero kiel birdo, la gimnasto neaŭdeble saltas sur la maton kaj denove firme staras kun ambaŭ piedoj sur la planko, kiun li antaŭ minutoj forlasis.

J. KUYPERS, Rotterdam.

PAROLAS LA LEGANTO.

KIU ESTIS LA PAROLANTO ?

En Heroldo n-ro 8 (1057) aperis artikoleto sub la titolo « Kiu estis la parolanto ? ». Mi do informas vin, ke la parolanto en Hyde Park estis s-ro I. C. Evans, 10 St. Philips Place, London W.2, tiu sama kiu jam verkis por Heroldo artikolon pri « Esperanto por Islamanoj ! » (n-ro 3/1052).

A.M.

KONTRAŬ LA KONSKRIPCIO.

Rilate al la artikolo en n-ro 10 (1059), vi povas aldoni, ke 40 procentoj el la personoj petataj subskribas la peticion kontraŭ la konskripcio, kaj jam 2000 en mia urbo sin tiel registris kontraŭ deviga militservado.

V. VERDA.

RIDO SANIGAS

ESPERANTISTO AL ALIA.

— Mi vidas ke vi jam formanĝis vian supon. Sed vi ne havis kuleron ?

— Simpla afero : mi vidis kulon, kaptis je ĝi, la kulo forflugis, sed restis en mia mano unu piedeto, kaj per tiu kul-ero mi la supon manĝis.

LA SOPIRATA GASTO.

Mastro : Joĉjo, jen guldeno ! Mia bopatrino intencas viziti min. Iru al la stacidomo por akompani ŝin ĉi tien !

Joĉjo : Kaj kion fari, se ŝi ne alvenos ?

Mastro : Tiukaze, vi ricevos ankoraŭ unu guldenon.

****

REDAKCIA LETERKESTO.

Patrono. Kiel Patrono de Heroldo por 1947 anoncis sin s-ro T. G. Gueritte en Surbiton. Nian plej koran dankon !

Subtenantoj. Post la subten-abonoj, pri kiuj ni publikigis jam pli frue, alvenis ankoraŭ la jenaj SA por 1946 : J. Korinek en Brno kaj A. Klein en Montevideo. Kaj jen ankaŭ la unuaj SA por 1947 : 1. S-ino A. Kincaid, Portland/Or. ; 2. S-ro B. Bosma, Berlikum, Nederlando. — Brita s-ano Chambers donacis 5 ŝil. — Al ĉiuj ni kore dankas.

Kie nia lingvo devis fariĝi la malaja.

En n-ro 3 (1052) ni publikigis artikoleton pri la restado de nederlanda samideano en koncentrejo, « kie nia lingvo devis fariĝi Napola dialekto ». Nun ni legas en « Libera Tribuno » pri simila kazo, kie nia lingvo devis fariĝi la *malaja*. Temas pri la spertoj de japana esperantistino kiu edziniĝis al ĉina samideano kaj iris loĝi kun li en lia lando. Jen kion skribas pri tio J.W. en la nomita revuo :

« Pro la milito inter Japanio kaj Ĉinio ŝi renkontis multajn malfacilaĵojn : suspektemon, malŝaton, polican demandadon, eĉ danĝeron ... sed ankaŭ spertis vere internacian kamaradecon inter la ĉinaj kamaradoj. Alveninte en Ĉinio, ŝi devis ŝajnigi ke ŝi naskiĝis en Malajujo kaj povas paroli nur la malajan lingvon. Ŝi kaj la edzo parolis Esperante — malaje por fremduloj ! »

Mem la (nenomita) sinjorino skribas : « Ankaŭ mi, japanino edziniĝinta al ĉino, promenas tra la aromaj krizantemoj blankaj kaj flavaj. Sed ne sereno estas en mi. Mil vortoj, kiujn mi volas diri al la ĉinaj popolanoj, senespere kuŝas en mia korfundo ; dek mil vortoj, kiujn mi volas ekkrii al la japanaj soldatoj, eble tre proksimaj de ĉi tie, estas sin puŝontaj tra mia gorĝo. Tiuj sodatoj buĉadas la ĉinojn kaj ili mem estas viktimoj de la japanaj faŝistoj. Neeviteble ili ankaŭ vundiĝas kaj mortas. Por siaj malamikoj ili verŝas la sangon najbaran kaj ankaŭ sian ... »

Ordono por instrui Esperanton en hungaraj komerclernejoj.

Komerca ministro Aleksandro Rónai eldonis sub n-ro 45156/1946.1/4 ordonon, ke Esperanto povas esti instruata en la komercaj mezlernejoj semajne po du horoj, kiel fakultativa instruobjekto. La lernantoj devas pagi 6 forintojn monate. HES komencis la propagandon por akiri lernantojn. Al s-ro L. Kökény, prezidanto de HES, kiam tiu dankis pro la ordono, la ministro deklaris ke li volonte apogas Esperanton, kaj li deziras ke oni instruu ĝin en la hungaraj kiel ankaŭ en la eksterlandaj lernejoj.

La Ministerio por Instruado permesis la instruadon de Esperanto en vesperaj laboristgimnazioj kaj lernejoj anstataŭ aliaj lingvoj, sed la lernantoj devas pagi la instruhorojn (ĉe aliaj studobjektoj ili ne bezonas pagi) ; do granda rezulto ne estas atendebla.

La opinio de Komerca Ĉambro.

La Budapesta Komerca kaj Industria Ĉambro skribis la 7-an de decembro al la hungara ĉefdelegito de IEL, ke en ĝia korespondado Esperanto ĝis nun ne ludis ian rolon. « Tamen, pro la relativa facileco de la ellernado de la lingvo kaj pro ties klaraj esprimeblecoj ni opinias eble, ke la klopodo, disvastigi la lingvon Esperanto, estos sukcesa. » La Ĉambro promesis studi la aferon ; do estus bonege, se multaj komercaj kaj industriaj entreprenoj *serioze* skribus al ĝi, precipe interesiĝante pri la venonta Budapesta Foiro.

TEĴA aranĝas fakkunvenojn.

Kio estas TEĴA ? Nu, ĝi estas la Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio, kiu havas membrojn en 21 landoj. Ĝia prezidanto estas C. Hilmer Johansson, ĉefredaktoro de la ĵurnalo «Ostgöten» en Linköping, Svedujo ; sekretario kaj kasisto estas redaktoro Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg, Svedujo. Jarkotizo unu dolaro. Fakkunvenoj estas preparataj okaze de la Universala Kongreso en Bern kaj de la SAT-Kongreso en Aarhus. Ĉiuj ĵurnalistoj, kiuj partoprenos tiujn kongresojn, estas petataj sciigi tion al la sekretario.

La 850-vorta vortaro de Basic estas fantazio aŭ trompo.

« Estas mirinde ke eminentuloj kiel W. Churchill kaj Prof. W. Murdoch subtenas la senbazan aserton de la aŭtoro de Basic English ke lia lingvaĵo estas tenata en 850 vortoj », skribas W. T. Casey, Perth, en « La Rondo ». Ekzamenante la liston, ni rimarkas ke malestas nomoj de insektoj, birdoj, fiŝoj, bestoj, numeraloj, tagoj, monatoj kaj ilaroj de metioj. Sed ĝustigo venas ! C. K. Ogden (la aŭtoro de Basic) certigas en libro « Basic English », paĝo 5, ke oni presas anglan vortaron kun 7500 plej oftaj vortoj, kaj ĝeneralan vortaron de 25.000 vortoj ! Li ankaŭ promesis vortaron kun 10.000 sciencaj terminoj. Tial Basic English kompleta kun 850 vortoj estas fantazio, mito !

Cetere, en Basic aperas granda nombro da esceptoj kontraŭ reguloj de alfabeto, gramatiko kaj elparolo. La aŭtoro, postulinte ke C estu parolata kiel K, tamen mencias longan liston laŭ kiu C estas elparolata kiel S. Eŭropanoj sentus genon, se ili penus lerni la aron da vortoj, kies lastaj kvar literoj estas *ough*, ekz. : bough, cough, dough, rough, trough, thorough. Alia regulo ordonas, ke la antaŭlasta silabo estu akcentita ; sekvas tion konfeso ke estas preskaŭ cent esceptoj. Ogden tiom forte substrekas tiun gravan regulon, ke li avertas studantojn ke ili devas nepre meti la akcenton sur la ĝustan silabon, alie la vortoj estos nekompreneblaj. Reguloj pri silabado, elparolo, formado de vortoj, gramatikaĵoj, ho ve !, ĉiuj havas esceptojn. La novaj Basic-vortaroj plene ĥaosigos la projekton.

Nederlandaj gejunuloj atentu ! « Juko » aranĝas duan renkontiĝon en la junulargastejo « Rynauwen » en Bunnik apud Utrecht, la 8.-9.2.1947. Partoprenkosto gld. 2.—, sendota ĝis 5.2. Adresojn vidu sur paĝo 2 de tiu ĉi numero !

Ni recenzas.

P. van Dorp, sac. : Biblio aŭ instru-aŭtoritato ? Libere tradukita el la nederlanda lingvo. 87 pĝ., 15 ½ x 24 cm, broŝ. Prezo gld. 1.60 aŭ 8 resp.-kup. Havebla de la eldonejo : Internacia Katolika Informejo, sekr. Fr. M. Monulfus, Loonopzand, Nederlando. — Recenzo sekvos.

Aŭgusteno da Silva : Vivo de Zola. El la portugala tradukis Manuel de Freitas. 106 p., 13 ½ x 19 cm., broŝ. Prezo 8 resp.-kup. ĉe Portugala Eldona Rondo, Monte da Lapa 49-I., Porto, Portugalio. — Recenzo sekvos.

Propekto Literatura Mondo. Ricevebla de la administracio: Rökk Szilard u. 28, II., 18, Budapest VIII, Hungarujo. « Ĝoje ni anoncas, ke Lit. Mondo, la beletra revuo de Esperanto, reviviĝas por ree plenumi sian taskon : la kulturadon de nia literaturo. » (K. Kalocsay.) — « Ni prizorgu la purecon kaj abundecon de la komuna kulturfonto, por ke ĝi povu servi al la soifantoj pri belo, bono, kaj noblo. » (J. Baghy.) La prospekto enhavas kontribuaĵojn, krom la jam nomitaj, de L. Tarkony (Totsche) kaj F. Szilagyi, kaj la prezojn por abono kaj libroj, en usonaj dolaroj. Jarabono kostas 2.50 dolarojn.

ENIGMO-KONKURSO
N-ro 9

SILAB-ENIGMO.

a — a — a — a — a — a — bi — bla — da — dar — di — do — e — e — e — e — go — go — i — i — i — in — is — iz — ja — klip — ko — kor — kor — li — li — lo — lu — ma — ma — ne — ni — no — no — nu — o — or — pe — ra — re — re — ri — ro — ro — so — stan — ta — to — to — to — vi — zi.

Hodiaŭ ni donas por solvi nur unu solan enigmon. El la supraj 57 silaboj estas formotaj 15 vortoj, kies unuaj kaj triaj literoj, legataj de supre malsupren, formas citaĵon el poemo de N. Hohlov.

Jen la signifo de la vortoj :

1. flago ; 2. edukisto ; 3. urbo en Egiptujo ; 4. sin returni ; 5. biblia nomo (Esperanta formo) ; 6. usona ŝtato (Esperanta formo) ; 7. romano tradukita en Esperanto (nun elĉerpita) ; 8. neprofesiulo ; 9. mallumiĝo ; 10. denova invito ; 11. irvojo de astroj ; 12. nefarebla ; 13. birdo ; 14. muzikinstrumento ; 15. monato.

Por la ĝusta solvo de ĉi-supra enigmo ni fiksis la jenajn premiojn :

1. Braga : Esperanto-Modelo.
2. Puŝkin : La kapitanfilino.
3. Tri brazilaj Esperanto-poŝtmarkoj.

Solvoj (sur aparta papero aŭ poŝtkarto) alvenu ĝis la 22-a de februaro al la redakcio de Heroldo, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.

*

SOLVOJ
de la Enigmo-Konkurso N-ro 7.

NOMBRO-ENIGMO.

Mondhelplingvo, oleo, nevino, diplomo, hieno, epilogo, Londono, pendigilo, Leopoldo, idolo, novelo, geheno, vomemo, Odilio.

TRI RADIKOJ EN UNU.

Kar', am', bol' ; karambolo.

*

Tiun ĉi fojon alvenis nur 17 solvoj el 7 landoj, el kiuj 15 estis korektaj. Ĉu la ciferan enigmon oni trovis pli malfacila ol krucvort- aŭ silab-enigmojn ? Aŭ ĉu ĝi estis nesufiĉe interesa ? Jen la premiitoj :

1. F-ino S. Visser, Hilversum, Ned.
2. A. Pittoors, Deurne, Belgujo.
3. P. Brunet, Valenciennes, Francujo.

EKZAMENU VIN MEM !

Respondoj al la demandoj en la pasinta numero.

33. Ne ; ĉar Anglic estas nenio alia ol nova ortografio de la originala angla lingvo; kaj Basic English estas ekstraktaĵo el la originala angla lingvo, eĉ kun ĝia originala (ne-reformita) ortografio.
34. L. de Beaufront (kiu poste publikigis propran helplingvan projekton Ido, nun preskaŭ forgesitan), C. Bourlet, Th. Cart, G. Moch, G. Chavet, E. Boirac, P. Fruictier, Rollet de l'Isle.
35. La instruisto kutimis resti tempeton ĉe la pastro por ordigi la junularon kaj poste malsupreniri kaj rakonti al ili la rezultaton ; ne estis ja la fina decido, sed estis tio, pri kio la pastro kaj li provizore interkonsentis. (El « Gaja knabo », de Bj. Björnson, paĝo 41.)
36. a) Prof. D-ro Björn Collinder ; b) ĉe J. Muusses, Purmerend, Nederlando (en la serio « Muusses Esperanto-Biblioteko »).

Novaj demandoj kaj taskoj.

37. El kiu libro estas la jena paragrafo : Fantazio, frenezo, delira iluzio — eble diros kelkaj, kiel estus dirintaj multaj antaŭ 60 jaroj, se oni parolus al ili pri fotografado en la malhelo aŭ momenta buŝa transsendo de sciigoj kaj ordonoj en la cititaj kazoj per la telefono. Kaj la tuta mondo vidis la hieraŭajn utopiaĵojn transformitaj en hodiaŭajn faktojn, same kiel el multaj nunaj fantaziaĵoj ekestos la morgaŭaj realaĵoj.
38. Kion signifas la sekvanta frazo en la tiel nomita « kokina » lingvo, ŝerce uzata de infanoj ? :
Ĉuhudifu vihidifi pahadifa rohodifo lashasdifas Eshesdifes pehedife ranhandifan tonhondifon ?
39. Korektu la sekvantan frazon : Se la suno brilis, estas varma, kaj ni promenos. (5 variaj simplaj frazoj kun variaj sencoj estas eblaj.)

La Esperanta gazetaro

(Daŭrigo.)

Brazilo.

Recife (Pernambuco), Rua Gomes Coutinho 318, Casa Amarela, PERNAMBUCO ESPERANTISTA. Ni ricevis nur unu numeron presitan, sept.-nov. 1945.

Rio de Janeiro, Praça da Républica 54, O BRASIL ESPERANTISTA. Ni ricevis du numerojn : jan.-junio 1945 kaj okt.-dec. 1946.

Salvador (Bahia), Rua do Bangala 18, ESPERANTISTA BAHIANO. Ni ne vidis numeron ; do verŝajne ĝi ne plu aperas.

Bulgarujo.

Sofia, Str. Grafo Ignatiev 2, INTERNACIA KULTURO. Komencis aperi en aŭg. 1945 kaj aperigis ĝis nun entute 12 numerojn. Ilustrita kaj bone presita, kun varia enhavo, ĉefe literatura-kultura ; bone redaktita, tendence-kontraŭfaŝisma.

Ĉeĥoslovakio.

Praha 47, Svaz esperantistu, ESPERANTISTA. (Ni esperas ke tiu ĉi adreso sufiĉas, sed ni ne trovis alian.) Bone redaktita kaj bone presita. Aperas monate. Ni ricevis n-rojn 5-6, 8 kaj 9 (de 15.12.46).

Zilina, Privovarskâ 3, ESPERANTISTO SLOVAKA. Bone redaktita kaj bone presita; ni ricevis du numerojn (1-2 kaj 3-6).

Danlando.

Kóbenhavn O, F-ino J. Christensen, Jagtvej 179, DANSK ESPERANTO-BLAD. Tre bone presita. Bedaŭrinde ĝi atingas nin tre neregule. Ni ricevis el 1945 : n-rojn 7-8, 10-11 ; el 1946 : 3-6, post junio nenion plu.

Randers, Box 30, MONDA REVUO. Bone presita. Klopodas imiti naciajn ilustritajn revuojn, sed aperas neregule : dum 1946 en marto, majo, junio kaj julio, poste plu nenio.

Egiptujo.

Cairo, P.O.B. 450, LA EGIPTA ESPERANTISTO. Dumonata, multobligita. Ni ricevis n-rojn 5-6, 9-11.

Finnlando.

Seinäjoki, ESPERANTO-AIRUT. Ni ricevis du bone presitajn numerojn (jan. kaj marto) ; ŝajne ne plu aperas.

Francujo.

Lyon VII, 32 Cours Gambetta, KOMPRENI. Bone presita, interesa revuo, sed ĉu post junio ĝi ne plu aperas ? (Ni ricevis n-rojn 3-5, de aprilo-junio.)

Paris 10, 34 rue de Chabrol, FRANCA ESPERANTISTO. Oni bonvolis postliveri al ni n-rojn 61-67 kaj 70-76 (lasta numero de aŭg. 1946). Bone redaktita gazeto, kaj unu el niaj plej valoraj, se ĝi aperus regule ĉiumonate.

Paris 9, 46 rue Lamartine, LA INTERLIGILO. Oficiala organo de ILEPTT. Ni ricevis unu numeron (185-186) bone presitan.

Paris 20, SAT, 67 avenue Gambetta, LA KOSMOPOLITO. Ni ankoraŭ ne vidis tiun gazeton, kvankam ni plurfoje liveris interŝanĝ-ekzemplerojn ; kredeble do ĝi ne plu aperas.

Paris 11, E. Vivancos, 1 rue Fontaine-au-Roi, SENŜTATANO. Anarkiista gazeto presita. Ni ricevis unu numeron (n-ro 5, nov.-dec. 1946).

Perpignan, 5 Quai Vauban, VERDA STELETO. Presita revueto trimonata. Ni ricevis n-rojn 1-4.

Germanujo.

München 23, Postfach 47, CIRKULERO DE ESPERANTO-GRUPO « LABORO ». Presita gazeto en formo de cirkulero, dumonata. Ni ricevis n-rojn 4-6 (jul.-dec. 46).

Greklando.

Athinai 8, Rodou 23, HELENA ESPERANTISTO. Presita dumonata organo de helenaj esperantistoj. Ni ricevis 4 numerojn (jan.-aŭg. 46).

Hungarujo.

Budapest VIII, Fiumei u. 4-II-5, HUNGARA ESPERANTISTO. Ni ricevis la unuan numeron, presitan.

Budapest VIII, B. Bleier, Rökk Szilârd u. 28, LITERATURA MONDO. Ni ricevis prospekton pri baldaŭa reapero de tiu (antaŭ la milito) ĉefa literatura revuo esperantista.

Budapest VIII, S. Szalay, Esperanto-strato 39, SZALAY-CIRKULERO. Bone presita revuforma cirkulero, kiu « ne pretendas esti esperanta gazeto, ĝi estas nur informilo de la Szalay Esperanto libroeldonejo kaj vendejo». Ni ricevis no-rojn III kaj IV.

Irlando.

Béal Atha an Fheadha, Co. Mhuigheo, Cumann Esperantóirina hEireann, LA IRLANDA ESPERANTISTO. (Ŝajne la sekvo de « Irlando Vokas ».) Dumonata, multobligita, kun materialo precipe pri Irlando, por traduko kaj publikigo en alilandaj gazetoj.

Dundroma-Dublin, Sonas, Cnoc na hInneona, IRLANDO VOKAS. (Ŝajne nun nomiĝas « La Irlanda Esperantisto », vidu tiun !)

Japanujo.

Tokio, J.E.I., Hongo-Motomachi I-13, LA REVUO ORIENTA. Aperas pli malpli regule. Presita. Ni ricevis n-rojn 3/1945 kaj 1-3/1946, pere de usona samideano.

Jugoslavio.

Ljubljana, Slovenia Esperanto-Ligo, Cankarjevo nabrezje 7, I., TRIGLAVO. Ni ricevis unu solan numeron 4-5 ; ĝi estas tre bone multobligita.

Kanado.

Windsor, Ontario, 16 Dominion Boulevard, MONDA BONVOL-SERVO. Ni ricevis : vol 3, n-ro 12 ; vol. 4, n-roj 1-12. Multobligita, kun interesaj artikoloj (por represo) en Esperanto kaj angla lingvo (paralele).

(Daŭrigota.)

Esperanta Radio-Kalendaro.

Pri la regulaj Esperanto-dissendoj vidu en la pasinta numero !

La horo de *Warszawa* estas 21.10 GMT (22.10 MET), ĉiulunde.

Atentu pri *Hilversum* la 1.2., je 16.10-16.25 (kredeble tio estas MET; do 15.10-15.25 GMT); parolos v.Haren pri la paska kongreso de l' nederlandaj laboristaj esperantistoj. La 14.2., je 19.15-19.30 MET (18.15-18.30 GMT), parolos C. P. Brakké pri « Rekonstruo ». Ambaŭ je ondo 301 m. La unua parolado verŝajne okazos en la nederlanda lingvo.

ANONCETOJ

Anoncetoj kostas por ĉiuj 20 komencitaj vortoj aŭ mallongigoj kvinonon de la jarabono, aŭ 20 b. fk., aŭ 1.— gld., aŭ 5 resp.-kuponojn ; por trifoja enpreso duobla prezo. — Ni senpage publikigas anoncetojn pri serĉataj personoj kaj pri familiaj aferoj esperantistaj : naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo kaj gravaj jubileoj.

Naskiĝo Baur. Roman Bonde Baur, filo de ges-anoj. D-ro A. Baur, Tellstr. 9, *Bern,* Svislando, la 30.12.1946 ekhavis fratinon Yvonne Irene. — Koran gratulon !

Vivo de Zola, 106-paĝa libro ricevegla por 8 int. resp.-kuponoj de Portugala Eldona Rondo, Monte de Lapa 49-I., *Porto,* Portugalio.

La vivo de l' Eskimoj, 32-paĝa libreto kun bildoj, ricevebla por 2 resp.-kuponoj aŭ kontraŭ samvaloraj libroj de Portugala Eldona Rondo en *Porto,* Portugalio.

La Internacia Katolika Informejo senpage donas informojn pri la katolika religio al ne-katolikoj. Fr. M. Monulfus, sekretario, *Loonopzand,* Nederlando. (20)

Interŝanĝo de junulo dum libertempo. Mi deziras akcepti en mia komforta somerdomo junulon 17-19 jaran dum julio aŭ aŭgusto. Oni devos akcepti je samaj kondiĉoj mian filon Olivier (li estas 18 jara, franca, nun studento en liceo de Rabat, bonsana kaj bonedukita). La libertempo okazos en mia montara somerdomo de Ifrane, alteco 1800 metroj, bonega klimato. Prefero por esperantisto, kiu ankaŭ parolas angle. Skribu al Thollet, av. Clémenceau, *Port-Lyautey,* Maroko. (21)

Skribu multnombre ! Pentristo en Aŭstrujo serĉas gesamideanojn en la tuta mondo por vigla korespondado. Ankaŭ progresantoj estas invitataj. Mi interŝanĝas artrevuojn, ilustritajn gazetojn kaj poŝtmarkojn. Respondo garantiita. Afranku filatele ! Skribu tuj al Sepp Zeilhofer, Elisabethstr. 24, *Graz,* Aŭstrujo.

Korespondadon kun eksterlandaj gesamideanoj, prefere en Ĉeĥoslovakio (sed ankaŭ en aliaj landoj), serĉas Johannes Schmidt, Reinh. Wagnerstr. 13, *(10) Zittau i. Sa.,* Rusa zono, Germanujo.

8-jara knabo deziras korespondadon kun la tuta mondo, en Esperanto, angla aŭ germana lingvo. Bonvolu skribi al Rudi Russmayr, Knabenheim Parsch, *Salzburg,* Aŭstrio.

Sperta filatelisto deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Alb. Nielsen, Jagtvej 109 A, I., *Kopenhago N.,* Danio. Certa respondo.

Germanoj atentu ! Hungaraj esperantistoj ricevas leterojn el Germanujo, sed ili *ne* povas respondi, ĉar nuntempe ne ekzistas poŝta interrilato el Hungarujo al Germanujo.

Gimnaziano 14-jara deziras korespondi pri ĉiuj temoj kun gejunuloj tutmondaj. Certe respondos. Jac. Blokker, Bronsteeweg 26, *Heemstede,* Nederlando. (22)

33-jara Parizano deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn esperante, angle, germane. Raoul Duval, 35 rue de Montreuil, *Pantin* (Seine), Francujo.

Tutmonda Katolika Adresaro, 1947. Nun preta. Prezo 2 internaciaj resp.-kuponoj. Lorcân O hUiginn, *Dundroma-Dublin,* Irlando.

F-ino Ina Blaauwbroek (25-jara), tipistino, deziras tutmonde korespondi. Fuchsiastraat 64, *Den Haag,* Nederlando.

Filatelistoj atentu ! Seriozan interŝanĝon deziras kun ĉiuj landoj, donas saman nombron aŭ valoron, certe respondos : E. Mansikka, *Vaasa,* Finnlando.

Agrikulturistoj, ĝardenistoj, flegistoj de fruktarboj ! Mi petas komunikojn de viaj spertoj pri la arvikolo, la San-José-ŝildpediko kaj ceteraj domaĝ-insektoj kaj ties kontraŭbatalo. Bildoj deziataj. Respondo garantiita. Josef Eder, *Stattegg-Eichberg 72,* Poŝto Graz-St. Veit, Stirio, Aŭstrio.

Vegetaraj samideaninoj ! En mia patrujo malmulte da vegetarinoj vivas kaj pro tio mi ne povis ĝis nun edziĝi. Mi estas 35-jara, ses lingvojn parolanta naturamanto kaj ŝatus edzinigi belaniman, vegetaran sinjorinon. Leteron petas Szegö Andras, Leiningen 20, *Soroksar,* Hungarujo.

Du fratoj, 40- kaj 35-jaraj, deziras korespondi kun gesamideanoj. Skribu al Jochem Quispel, Maarland 4, *Rotterdam,* Nederlando. Respondo garantiita.

Korespondadon per ilustritaj poŝtkartoj deziras s-ro Iver Svarstad, P.O. Box 1909, *Long Beach,* California, Usono. (15)

Mi deziras serioze korespondadi kun gesamideanoj en la tuta mondo pri edukado, filozofio, naturfilozofio, senco de vivo, religio, vegetarismo ktp. Tomaŝ Balda, revuisto de Esperanto-klubo en Praha, Malâ Štěpânská 7, *Praha II,* Ĉeĥoslovakio.

Internacia Kulturo, la antifaŝista ilustrita revuo de la bulgaraj esperantistoj, estas ankaŭ en la nova abonperiodo abonebla ĉe Heroldo de Esperanto, *Scheveningen,* Nederlando. Abonkotizo (por kiu la eldonejo promesas 16 numerojn) 6.— guldenoj ; por abonantoj de Heroldo 4.50 guldenoj. (16)